

## KELKAJ ĜENERALAJ TRAJTOJ DE LA LINGVO POLA

Lingvo hindeŭropa, slava.

Preskaŭ ĉiuj vortoj estas paroksitonaj.

3 genroj: vira, ina kaj neŭtra.

Ne ekzistas artikoloj, ĉu difinaj, ĉu nedifinaj.

7 KAZOJ: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, vokativo, lokativo, instrumentalo.

ALFABETO:

A Ą B C ć D E Ę F G H I J K L Ł M N ń O ó P R S Ś T U W Y Z Ź ź Ż

Ekzistas majusklaĵ kaj minusklaĵ

Kelkaj strangaj literoj: Ą ć Ę Ł ń Ó Ś ź ż      ą ć ę ł ń ó ś ź ż

Pola	Pola	E-a prononco	Traduko (E-o)
<b>Ą</b> (nazala)	mąka	monka	faruno
<b>ć</b>	dodać	<u>doda</u> ć	aldoni
<b>Ę</b> (nazala)	mięso	mjenso	viando
<b>Ł</b>	sałata	sa <u>ŭ</u> ata	laktuko
<b>ń</b>	koń	kojn	ĉevalo
<b>ó</b>	pokój	<u>pó</u> kuj	ĉambro
<b>ś</b>	oświata	o <u>ŝ</u> vjata	eduko
<b>ż</b>	żona	ĵona	edzino
<b>W</b>	owoc	<u>o</u> voc	frukto
<b>ż</b>	żrenica	ĵj <u>re</u> nica	pupilo

Detaloj pri prononco:

Pola	Pola	E-a prononco	Traduko (E-o)
<b>DZ</b>	dzvon	dzvon	sonorilo
<b>RZ</b>	gorzej	go <u>ĵ</u> ej	pli malbone
<b>CZ</b>	czekolada	ĉe <u>kol</u> ada	ĉokolado
<b>SZ</b>	szpinak	<u>ŝ</u> pinak	spinaco
<b>C</b>	cebula	ce <u>b</u> ula	cepo
<b>H</b>	hamak	<u>h</u> amak	hamako
<b>CH</b>	charakter	ha <u>r</u> akter	karaktero
<b>S</b>	rasa	rasa	raso
<b>Y</b>	Białystok	Bja <u>ŭ</u> estok	Bialistoko
Ĉiuj literoj aŭ digramoj estas prononcataj			

**Sonoraj konsonantoj** aŭ **sonoraj digramoj**, en fino de silabo, aŭ proksime de surda konsonanto aŭ digramo, **fariĝas surdaj**:

sonora litero aŭ digramo	Pola	E-a prononco	Traduko (E-o)
RZ → ŝ	<b>lekarz</b>	<b>l<u>é</u>kaŝ</b>	kuracisto
B → P	<b>babcia</b>	<b>b<u>a</u>p<u>ç</u>ja</b>	avinjo
D → T	<b>owad</b>	<b>ó<u>v</u>at</b>	insekto
G → K	<b>chirurg</b>	<b>h<u>i</u>ruk</b>	hirurgo
W → F	<b>wtedy</b>	<b>f<u>t</u>éde</b>	en tiu tempo
Z → S	<b>teraz</b>	<b>t<u>é</u>ras</b>	nun
ż → ŝ	<b>też</b>	<b>t<u>é</u>ŝ</b>	ankaŭ
Escepto:	<b>także</b>	<b>t<u>a</u>g<u>je</u></b>	
(tie-ĉi, la sonora konsonanto “venkas”, kaj la “K” fariĝas “G”)			

Pola	E-a prononco	Obs.	Traduko (E-o)
<b>PRZEDWCZORAJ</b>	pŝetfçoraj	przedwczoraj = przed + wczoraj	antaŭhieraŭ = antaŭ + hieraŭ
<p>Observu, ke en tiu-ĉi vorto, W fariĝas surda (F) pro proksimeco al la digramo CZ, kaj, tuj post, D fariĝas surda (T), pro la proksimeco al la ĵus-aperinta surda F.</p> <p>Krom tio, la digramo RZ fariĝas surda (Ŝ) pro proksimeco al la surda P.</p>			

La adverbo NIE (= ne), **antaŭ adjektivo**, estas uzata kiel prefikso:

Pola		Traduko
aktualna	nieaktualna	neaktuala
daleko	niedaleko	nemalproksima
dobrze	niedobrze	nebone
konwencjonalna	niekonwencjonalna	nekonvencia

Kelkaj literoj ŝanĝas sian prononcon, kiam ili estas sekvataj de la vokalo "i"

	Pola	E-a prononco	Traduko
<b>ci</b>	<b>ci</b> astko	<b>ĉj</b> astko	kuko
<b>si</b>	<b>sio</b> stra	<b>ŝj</b> ostra	fratino
<b>dzi</b>	<b>dzi</b> adek	<b>ĝj</b> adek	avo

Ĉe alia vokalo, la vokalo „i” fariĝas duonvokalo.  
 Observu, tie-ĉi, la uzadon de la polaj citiloj (la malferma citilo situas malsupre)

Al la konjunkcio “KAJ” respondas du vortoj en la Pola: “i” kaj “a”.

Oni uzas “i”, kiam oni daŭras parolanta pli malpli pri la sama afero,

Oni uzas “a”, kiam oni parolas pri alia afero.

E-o	Tie-ĉi pendas spegulo <b>kaj</b> tie staras ŝranko	(Prononco)
Pola	Tu wisi lustro <b>a</b> tam stoi szafa	tu viŝi lustro a tam stoj ŝafa
	(unu afero) <b>a</b> (alia afero)	
E-o	S-ro Nowak estas simpatia <b>kaj</b> ĝoja	(Prononco)
Pola	Pan Nowak jest sympatyczny <b>i</b> wesoły	Pan Nówak jést sêmpatêĉnê i wésó <sup>u</sup> łe
	( <u>la sama homo</u> estas simpatia kaj ĝoja)	

Pleonasma uzado de neaj vortoj:

Pola	Esperanto
nic	nenio
nie	ne
robię	mi faras
pospiesznie	haste
NIC NIE ROBIĘ POSPIESZNIĘ	
(Mi) <b>nenion ne faras</b> haste	

Neaj frazoj postulas **genitivon!**

jestem	estas	czytam	(mi) legas
tutaj	tie-ĉi	książki	libroj(n)
ma	estas	nie	ne
mnie	de mi		
Jestem tutaj		Czytam książki	
(Mi) estas tie-ĉi		(Mi) legas librojn	
<b>Nie ma mnie tutaj</b>		<b>Nie czytam książek</b>	
<b>Ne estas de mi tie-ĉi</b>		<b>Mi ne legas de libroj</b>	

Multege da konsonantkaramboloj:

Pola	E-a prononco	Traduko
człowiek	ĉŭóvjek	homo, civitano
dziecko	ĝjécko	infano
dziewczyna	ĝjefĉêna	virino, amatino
kelkfoje malfacile prononceblaj...		
czcić	ĉĉiĉ	adori
czczo	ĉĉó	fasto
październik	paĵĵjéjník	oktobro
pchła	phŭá	pulo
plwocina	plvoĉina	salivo
płucny	pŭúĉne	pulma
poniedziałek	ponjeĝjáűek	lundo
rzodkiewka	ĵotkiefka	rafaneto
szczęście	ŝĉejnŝĉje	sorto
szczupła	ŝĉupŭa	svelta (virino)
trzcina	ĉĉina	kano

Tamen, multege da vortoj estas similaj al esperantaj:

Jen kelkaj ekzemploj:

Pola	E-a prononco	Traduko
adres	<u>a</u> dr <u>e</u> s	adreso
af <u>e</u> ra	af <u>e</u> ra	afero
ak <u>a</u> ces	ak <u>a</u> ces	akceso
akur <u>a</u> t	akur <u>a</u> t	akurate
ambasada	ambasada	ambasado
ap <u>t</u> eka	ap <u>t</u> eka	apoteko
arab	<u>a</u> ra <u>p</u>	arabo
areszt	<u>a</u> re <u>ŝ</u> t	arestejo
blond	blont	blondulo
cel	cel	celo
chemia	<u>h</u> em <u>j</u> a	ĥemio
cygaro	cegaro	cigaro
czy	ĉe	ĉu
debiut	<u>d</u> eb <u>j</u> ut	debuto
defilada	defilada	defilado
dyżur	<u>d</u> e <u>ĵ</u> ur	deĵoro
dziwka	d <u>ĵ</u> ifka	putino
farba	farba	farbo
fasola	fa <u>s</u> o <u>l</u> a	fazeolo
fotel	<u>f</u> o <u>t</u> el	fotelo
gapa	gapa	gapa
grymas	<u>g</u> re <u>m</u> as	grimaco
grosz	gro <u>ŝ</u>	groŝo
hazard	<u>h</u> azart	hazardo
jacht	jaht	jaĥto
kanapa	kanapa	kanapo
karat	<u>k</u> ar <u>a</u> t	karato
karo	karo	karoo
kasa	kasa	kasoo
kask	kask	kasko
kelner	<u>k</u> el <u>n</u> er	kelnero
kiełbasa	kje <u>u</u> basa	kolbaso

kier	kjer	kero
kilka	kilka	kelkaj
klawisz	<u>kl</u> aviŝ	klavo
kokos	<u>ko</u> kos	kokoso
komfort	<u>ko</u> mfort	komforto
krab	krap	krabo
kran	kran	krano
krestomatia	krestoma <u>tj</u> a	krestomatio
kulisy	ku <u>lj</u> se	kulisoj
kurwa	kurva	putino
kuzyn	<u>ku</u> zen	kuzo
makler	<u>ma</u> kler	makleristo
marmolada	marmolada	marmelado
maska	maska	masko
maszyna	maŝena	maŝino
materac	ma <u>te</u> rac	matraco
mordować	mord <u>o</u> vaĉ	murdi
nekrolog	ne <u>kr</u> olok	nekrologo
no	no	nu
obiekt	<u>o</u> bjekt	objekto
pajac	<u>pa</u> jac	pajaco
papuga	papuga	papago
pejzaż	<u>pe</u> jzaŝ	pejzaĝo
pierdzieć	<u>pi</u> ér <u>dj</u> jeĉ	furzi
pik	pik	piko
plaga	plaga	plago
plecak	<u>pl</u> ecak	tornistro (por adoltoj)
portret	<u>po</u> rtret	portreto
<b>prababcia</b>	prabap <u>ĉ</u> ja	praavinjo
<b>praprababcia</b>	praprabap <u>ĉ</u> ja	prapraavinjo
prawo	pravo	juro, dekstro
prelegent	pre <u>le</u> gent	preleganto
rabat	<u>ra</u> bat	rabato
raport	<u>ra</u> port	raporto
rasa	rasa	raso
renesans	re <u>ne</u> sans	renesanco

reżyser	reĵ <sup>u</sup> ser	reĝisoro
rola	rola	rolo
rosa	rosa	roso
róża	ruĵa	rozo
ryż	reŝ	rizo
sałata	saŭata	laktuko
sałatka	saŭatka	salato
syrop	s <sup>u</sup> rop	siropo
syty	s <sup>e</sup> te	sata
sznur	ŝnur	ŝnuro
szynka	ŝenka	ŝinko
talia	talja	talio
torf	torf	torfo
tornister	tornister	tornistro (por infanoj)

Ekzemplo de GENITIVO kaj AKUZATIVO:

siostra	fratino
<u>Jurek</u>	Georgo
jest	estas
mała	malgranda
Siostra <u>Jurka</u>	fratino <u>de Georgo</u>
ma	havas
Siostra <u>Jurka</u> jest mała	GENITIVO
(La) fratino <u>de Georgo</u> estas malgranda	GENITIVO
Jurek ma małą siostrę	AKUZATIVO
Georgo havas <u>malgrandan fratinnon</u>	AKUZATIVO
<p>Observu, ke adjektivo ricevas la finaĵon “a”  kaj substantivo ricevas la finaĵon “ę”,  <b>en akuzativo singularo</b></p>	

Interpunkcio simila al tiu de E-o (uzado de komo antaŭ la konjunkcio “ke”):

Pola	Esperanto
Ona	Ŝi
uvaž	opinias
ze	ke
zawsze	ĉiam
ma	havas
rację	pravon
Ona <u>uvaž</u> , <b>ze</b> zawsze ma rację	
Ŝi <u>opinias</u> , <b>ke</b> (ŝi) ĉiam havas pravon (pravas)	

### DEKLINACIO:

Dependas esence

- 1) ĉu la vorto estas adjektivo aŭ substantivo,
- 2) ĉu la vorto estas vira, ina aŭ neŭtra
- 3) ĉu temas pri viva estulo aŭ ne
- 4) ĉu la vorto estas en nominativo, akuzativo, genitivo, ktp.
- 5) ĉu temas pri singularo aŭ pluralo
- 6) ĉu la vorto finiĝas per C, G, L, K, M, N, RZ ktp.

### POLISEMIO:

Ekzistas kelkaj strangaj polisemioj:

pokój	= ĉambro
pokój	= paco
jądro	= nukleo (fiziko)
jądro	= testiko (anatomio)
cholera	= ĥolero
cholera!	= merdo!

## GENROJ: VIRA, INA, NEŬTRA

VIRAJ	Traduko	INAJ	Traduko	NEŬTRAJ	Traduko
czwartek	<b>ĵaŭdo</b>	buĵka	pano	biurko	skribtablo
fotel	fotelo	fasola	fazeolo	drzewo	arbo
kartofel	terpomo	kawa	kafo	dziecko	infano
kran	krano	książka	libro	gardĵo	gorĝo
kubek	cilindra kaftaso	mężczyzna	viro	krzesĵo	seĝo
list	letero	niedziela	<b>dimanĉo</b>	lustro	spiegulo
piątek	<b>vendredo</b>	podłoga	planko	masĵo	butero
plac	placo	sobota	<b>sabato</b>	mieszkanie	apartamento
poniedziałek	<b>lundo</b>	środa	<b>merkredo</b>	mleko	lakto
wtorek	<b>mardo</b>	herbata	teo	okno	fenestro
Viraj vortoj finiĝas per konsonanto (preskaŭ ĉiam)		Inaj vortoj finiĝas per "A" (preskaŭ ĉiam)		Neŭtraj vortoj finiĝas per "O" aŭ "E" (preskaŭ ĉiam)	
Kafo kun lakto			Kawa z mlekiem (instrumentalo)		
Pano kun butero			Buĵka z masĵem (instrumentalo)		

### Kuriozaj esprimoj:

pli-malpli	MNIEJ WIĘCEJ = ( <u>malpli</u> - <u>pli</u> )
tie = TAM	tiu-ĉi = TEN
TAMTEN = tiu	<u>tam</u> + <u>ten</u> = LA <u>tiu-ĉi</u> , kiu estas <u>tie</u> (= LA tiea „ <u>tiu ĉi</u> ”)
Sur (la) blanka tablotuko <u>kuŝas</u> teleroj	
Na bialym obrusie <b>stoją</b> talerze	
stoją talerze = <u>staras teleroj</u> ( tamen la teleroj <b>kuŝas</b> = <b>leżą</b> )	
Oni <u>ne</u> diras: <b>leżą</b> talerze	

1	jaro	1	ROK
2,3,4	jaroj	2,3,4	LATA
5,6,7, ktp.	jaroj	5,6,7, ktp.	LAT
22, 43, 64	jaroj	22, 43, 64	LATA (finiĝas per 2,3,4)
<u>ile</u> <b>masz</b> lat?			– Mam .... (rok, lata, lat)
<u>kiom da</u> havas ( <b>vi</b> ) jarojn?			– Mi havas ..... jarojn

Mi havas 1 jaron	Mam 1 ROK
Mi havas 2 jarojn	Mam 2 LATA
Mi havas 3 jarojn	Mam 3 LATA
Mi havas 4 jarojn	Mam 4 LATA
Mi havas 5 jarojn	Mam 5 LAT
Mi havas 6 jarojn	Mam 6 LAT
Mi havas 7 jarojn	Mam 7 LAT
kaj tiel plu...	i tak dalej...

Saluton!	Cześć !
Dankon!	Dziękuję bardzo!
Ĝis revido!	Do widzenia !
Kiel vi fartas?	Jak się czujesz ?
Mi fartas bone.	Czuję się dobrze.
Mi parolas la Polan	Mówię po polsku
Li ne scias paroli la Portugalan	On nie umie mówić po portugalsku
Mia frato ne komprenas la Anglan	Mój brat nie rozumie po angielsku

## PRI LA AKUZATIVO

	SUBSTANT-O	ADJEKTIVO
<b>neŭtra estulo</b> (viva aŭ neviva)	AKZ = NOM ( <b>senfinaĵa</b> )	finaĵo -E
<b>senviva vira estulo</b>	AKZ = NOM ( <b>senfinaĵa</b> )	finaĵo -Y, (i)
<b>viva vira estulo</b> ( <b>vira</b> homo aŭ besto)	finaĵo -A	finaĵo -EGO
<b>INA estulo</b> (viva aŭ neviva)	finaĵo -Ĝ	finaĵo -Aĝ

### Ekzempletoj

NOM	AKZ	Temas pri	Traduko (E-o)
Adam	Adama <b>a</b>	Vira Vir. E	Adamo
szef	szefa <b>a</b>	Vira Vir. E	ĉefo
pies	psa <b>a</b>	Vira Vir. E	hundo
kot	kota <b>a</b>	Vira Vir. E	kato
kot <b>ka</b>	kotk <b>ę</b>	INA estulo	katino
dobry	dobrego <b>a</b>	Vira adjektivo	bona
dobra	dobra <b>ę</b>	Ina adjektivo	bona
miły	miłego <b>a</b>	Vira adjektivo	ĉarma
miła	miła <b>ę</b>	Ina adjektivo	ĉarma
Mój pies jest miły		Mia hundo estas ĉarma	
Mam psa i kota		Mi havas hundon kaj katon	
Szef <u>Adama</u> jest dobry		La <u>ĉefo de Adamo</u> estas bona	
Adam ma dobre <b>go</b> szefa		Adamo havas bonan ĉefon	
Mam miłego kota		Mi havas ĉarman katon	
Mam miła kot <b>ę</b>		Mi havas ĉarman katinon	

**Ekzempletoj:**

NOM	AKZ	Temas pri	Traduko (E-o)
piwo	piwo	NEŬTRA	biero
wino	wino	NEŬTRA	vino
dobre	dobre	NEŬTRA	bona
Lubię piwo		Mi ŝatas bieron	
Lubię dobre wino		Mi ŝatas bonan vinon	

**Ekzempletoj:**

NOM	AKZ	Temas pri	Traduko (E-o)
twój	twoj <b>ego</b>	Pron/adjek.	via
nowy	now <b>ego</b>	Adjektivo	nova
adres	adres <b>u</b>	S Vir. E	adreso
Znam twoj <b>ego</b> now <b>ego</b> adres <b>u</b>			
Mi scias vian <b>n</b> novan <b>n</b> adreson <b>n</b>			

**Ekzempletoj:**

NOM	AKZ	Temas pri	Traduko (E-o)
twoja	twoj <b>ą</b>	INA adjektivo	via
ciotka	ciotk <b>ę</b>	INA estulo	onklino
duża	duż <b>ą</b>	INA adjektivo	granda
restauracja	restauracj <b>ę</b>	INA estulo	restoracio
Znam twoj <b>ą</b> ciotk <b>ę</b>		Mi konas vian <b>n</b> onklinon <b>n</b>	
Znam duż <b>ą</b> restauracj <b>ę</b>		Mi konas grandan <b>n</b> restoracion <b>n</b>	